nia voĉo

madrida esperanto-liceo junio 2011

## PROKSIMIĜAS LA 70a HISPANA ESPERANTO-KONGRESO

Kiel ni jam anoncis en antaŭaj numeroj de "Nia Voĉo", la venonta 70-a Hispana Kongreso de Esperanto okazos en nia regiono, kun la kunlaboro de Madrida Esperanto-Liceo. Ĝi disvolviĝos en mirinda loko: en San Lorenzo de El Escorial, fronte de la fama Monaĥejo, en la antaŭa Domo de Metioj, kiu nun servas kiel Kulturdomo. Ĝi estos inaŭgurita la 28-an de junio, kaj daŭros en tiu urbo ĝis la 2-a de julio, kun postkongresa ekskursado al la ĉefurbo Madrido dum la dimanĉo 3-a de julio.

La programo disvolviĝos laŭ la titolo: ***"Esperanto 3.0 – E-agado en la 21a jc / En esperanto en el siglo XXI"***. La kerno de la programo celos analizi kiamaniere Esperanto adaptiĝos al la novaj uzoj de komunikado kiun la nuna epoko ebligas al la parolantoj, kaj montros la manieron en kiu la sinsekvaj generacioj de uzantoj kaj agantoj profitas el novaj informkanaloj.

Oni programis praktikajn ekzemplojn, en kiuj la partoprenantoj povos pridiskuti kaj utiligi novajn teknologiojn de eldonado, de distribuado de filmoj, de muziko. Malfermaj debatoj kaj atelieroj konsistigos centron de la programo pri la nunaj perspektivoj de la esperanta agado. Estos kundebatataj la perspektivoj de la hispana movado, la organizado de Hispana Esperanto-Federacio aŭ la eldonado de ĝia bulteno.




La kongreso celas esti partopreniga. Tial, krom tradiciaj prelegoj, estas antaŭvidita prelegetaro, sub la formo de *peĉakuĉo*, en kiu povas partopreni kongresanoj sen antaŭa sperto uzi la lingvon publike. Estas programitaj ankaŭ atelieroj pri verkado, pri deklamado, pri uzo de Vikipedio, pri enretigo de filmoj, pri uzo de muziko.

Ne mankos **kulturaj kaj distraj** programeroj. Oni antaŭvidas muzikajn koncertojn kaj teatraĵojn, inter kiuj ni povas konfirmi la ĉeeston de la konata pola bardo Georgo Handzlik. Libroservo estos disponebla dum la tuta kongreso. Aŭkcio de materialo priesperanta (al kiu vi mem povas kontribui) helpos financi nian movadon. Ludoj kaj aliaj amuzaĵoj ne mankos dum diversaj momentoj de la kongreso.

Grava estos la **turisma** flanko, nepra en tiu historia urbo kaj ĉirkaŭo. Estas nun organizataj vizito al San Lorenzo de El Escorial, ekskurso al Avilo (Ávila), grimpado al proksima montaro, gvidata travizito al la fama Eskoriala Monaĥejo. Kiel menciite, la dimanĉon 3-an de julio, estas programata postkongreso en la ĉefurbo Madrido, dum kiu eblos viziti la urbon mem kaj kelkajn ĝiajn ĉefajn vidindaĵojn.

Dum la sabato disvolviĝos tre atentinda ŝanco: la ebleco trapasi **oficialajn ekzamenojn** de Esperanto laŭ Komuna Eŭropa Referenckadro. La ekzamenoj povos okazi je ĉiuj tri ekzistantaj niveloj: B1, B2 kaj C1. Eblos trapasi la kompleksan ekzamenon (t.e. la skriban kaj la parolan parton), sed ankaŭ aparte iun el la du tipoj. Je sukcesa ekzameniĝo la ŝtate agnoskata hungara ekzamencentro ITK eldonos kvarlingvan diplomon por la kandidato.

La kotizo, aliĝmaniero kaj programo estas konsulteblaj en http://www.esperanto.es/kongreso. Kaj por kontakti la lokan organizantaron, utiligu la adreson info@esperanto.es

## EKSPOZICIO EN ALKORKONO

Inter la 20-a de majo kaj la 2-a de junio estis organizita Ekspozicio pri Esperanto, en kultura centro Viñagrande en Alkorkono (Alcorcón). La ekspozicio utiligis la panelojn kreitajn de HEF okaze de la 150-a datreveno de la naskiĝo de L. L. Zamenhof, kaj kiujn oni montris en antaŭaj okazoj en aliaj kulturejoj de la urbo. La 2-an de junio oni organizis prelegon en la sama kulturcentro (kun tre magra ĉeesto de publiko, oni agnosku)

La anonco vekis intereson de lokaj amaskomunikiloj. La plej atentinda estas intervjuo al Toño del Barrio, fare de la sudmadrida televido, kiu elsendas en la kanalo 30 de la TDT, kaj kiu estis ankaŭ spektebla en la retejo http://www.sur-madrid.com/ (ĉar la teĥnika kvalito de la retejo estas malbona kaj ankaŭ ĉar ĝi malaperos baldaŭ el la ĉefpaĝo, oni povas konsulti la adreson http://www.delbarrio.eu/blo/2011/05/esperanto-en-alcorcon/)

Informoj aperis ankaŭ en la radistacio Ser Madrid Oeste kaj en reta portalo http://noticiasdealcorcon.com/.

La ekspozicio translokiĝas poste al San Lorenzo del Escorial, kiel prologo al la hispana kongreso; de la 13-a de junio ĝi estos disponebla en la kulturcentro de la strato Vista Bella, kaj poste en la kongresejo mem.

## VIZITIS MADRIDON

Vizitis Madridon nia zaragoza amiko Eduardo Berdor, kiu rendevuis kun grupo de esperantistoj la 14-an de majo.

Fine de majo gastis en Madrido rusa esperantistino Elena Anisimova, kaj ankaŭ akordionisto Kim, el Kopenhago, venis al Madrido kelkajn tagojn i.a. por vidi persone la kampadejon 15.5 en la *Sunporda Placo*. En informa stando de la kampadejo, la grupo lin akompananta malkovris kaj renkontis Santiagon, el Kolombio, kiu ankaŭ parolas Esperanton.

## EN AMASKOMUNIKILOJ

La 29-an de majo, je la 20:30 estis elsendita intervjuo al Toño del Barrio en latina radio de Madrido http://www.radiotentacion.com en Programo "Operación Retorno".

## KAMPADEJO EN SOL

La asocio SAT-en-Hispanio, SATeH, esperantigis manifeston de la kampadejo organizita de la movado "Reala demokratio jam" en la madrida placo Puerta del Sol. La traduko estis publikigita en la retejo de la movado: http://madrid.tomalaplaza.net/manifiesto-2/#eo.

Pliaj informoj en la paĝo http://www.satesperanto.org/-Hispana-revolucia-movado-.html

## VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Niaj konversaciaj rondoj plu okazos regule ĉiulunde ekde la 18:30 h en la HEF-ejo, strato Rodríguez San Pedro 13-3º-7, tel. 914 468 079. Pri aliaj renkontoj, atentu la retajn diskonigojn en la retforumo esperanto_madride http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride.

madrida esperanto-liceo

San Alejandro 6-4ºB-ext. 28005 Madrid (nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 horo en Rodríguez San Pedro 13-3º-7, Madrid

http://www.esperanto.es/mel/ saluton@wanadoo.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com